

Uzo de refleksiva poseda pronomo (sian, al sia, pro sia, en sia, ...)

Sian estas poseda vorto. Ĝi signifas **la propran**.

*La infano ordigas **sian** ĉambron (la propran ĉambron, ne la ĉambron de alia persono).*

Sian (al sia, pro sia, en sia,...) estas uzata kiel la vorto sin, **por komplemento**, kiu **revenas al la subjekto** (aŭ revenas al la koncerna aktoro de la koncerna ago, se en la frazo estas du aktoroj).

*La patro permesas al **la filo** viziti **sian** amikinojn.*

Pro la fakto ke **sian** estas uzata **nur por komplementoj**, vi devas uzi nur **sian** (akuzativa formo) aŭ **prepozicio + sia**.

Sia sen la prepozicio ne povas stari. Neniam diru : "sia patro venis". Estas eraro. Atentu pri tiu punkto, kiu ne estas simila en pluraj lingvoj (inter aliaj en la franca).

Sian estas ankaŭ uzata por **komplemento** kiu revenas aŭ rilatas al **pluraj subjektoj**.

*La infanoj ordigas **sian** ĉambron.*

*La familioj revenas al **sia** domo.*

Tute logike, **la finaĵo** de **sian** (al sia, pro sia, sur sia, ..) **kopias la apudan vorton**.

*La infano ordigas **sian** ĉambron kaj **siajn** librojn.*

*La infanoj estas zorgemaj pri **sia** ĉambro kaj pri **siaj** libroj.*

Kaj se ĉiu infano havas **sian** propran ĉambron, temas pri pluraj ĉambroj, oni diras :

*La infanoj ordigas **siajn** ĉambrojn, ili estas zorgemaj pri **siaj** ĉambroj.*

Ekzerco : *Desegnu la trinkaĵon en unu glason.*



Bruno plenigas **lian** glason.

Bruno plenigas **ŝian** glason.

Bruno plenigas **sian** glason.